Beogrado ILEI

58-a Kongreso, 19-26/07/2025

# TURISMA OFERTO

## – KARAVANO, EKSKURSOJ, BANKEDO –

### ILEI-kongreso 2025





# Buskaravano al UK

**Tago kaj tempo:** la 26-a de julio 2025, 05h00–16h00/17h00

**Prezo**: Inter 80 kaj 100 EUR depende de la nombro de aliĝintoj

La buso veturos de la kongresejo en Beogrado ĝis la kongresejo en Brno.

La veturdaŭro planeblas inter 10 kaj 12 horojn kalkulante paŭzojn por manĝoj kaj refreŝiĝoj, kaj atendotempojn ĉe la landlimoj.

# TT1. Srem kaj Novi Sad – tuttaga busekskurso

**Tago kaj tempo**: la 23-a de julio 2025, 08h00–19h00

**Prezo**: 41 EUR

- inkluzivas la veturigon, ĉiĉeronadon kaj enirbiletojn
- ne inkluzivas tagmanĝon

*Srem* estas Panonia regiono inter la riveroj Danubo kaj Sava en *Vojvodino*, la norda aŭtonoma provinco de Serbio. Ĝian nordan parton, apud Danubo, ornamas la montaro *Fruŝka Gora* kun dudeko da monaĥejoj de serba ortodoksa eklezio.


*Montaro Fruška Gora*



Fortikaĵo Petrovaradin

*Novi Sad* estas la ĉefurbo de Vojvodino. Ĝi situas sur la bordoj de Danubo 90 km nordokcidente de nia kongresejo. Sur la dekstra bordo elstaras *la fortikaĵo de Petrovaradin*. Siatempe ĝi estis nekonkerebla per la tiama milita tekniko, sed hodiaŭ ĝin okupas nemilitaj institucioj – muzeoj, arkivoj, atelieroj – kaj, ekde la jaro 2001, ĝi estas okazejo de la fama muzikfestivalo Exit.

## PROGRAMO DE LA EKSKURSO

Ekveturo el Beogrado je la 8-a horo per aŭtobuso. Veturo aŭtovoje, poste tra orientaj deklivoj de Fruŝka Gora ĝis la monaĥejo *Novo Hopovo* (*Nova Hopovo*) kaj la urbo *Sremski Karlovci*.

Vizito al la monaĥejo fondita en la 15-a jarcento. Ĝian preĝejon oni taksas arkitekture la plej bela en la regiono de la montaro Fruŝka Gora.

Sremski Karlovci estas urbo tre grava por la moderna historio de Serbio. Ni promenos sur la centra placo kaj vizitos: la *Ĉefpreĝejon de Sankta Nikolao*, la *Patriarkejon* kaj la *Gimnazion de Karlovci*. Ĝi estas la unua serba gimnazio, malfermita en la jaro 1791.

Paŭzo por tagmanĝo inter 13h00 kaj 14h30. Opcioj:

- Lunĉpakaĵo el la hotelo, se vi rezervis tagmanĝojn en la kongresa hotelo
- Surloke mendi kaj mem pagi tagmanĝon en loka restoracio. Rekomendo: fiŝrestoracio *Karlovaĉka Ĉarda* (*Ĉardo de Karlovci*) sur la bordo de Danubo. Ĉardo estas hungara stepa aŭ kampara drinkejo, sed en Vojvodino ĝi estas tipa fiŝrestoracio kaj turisma/gastronomia logaĵo.



Sremski Karlovci

Pluveturo kaj vizito al la fortikaĵo Petrovaradin, kiun dum la historio konstruis kaj regis keltoj, romianoj, slavoj, hungaroj, turkoj. La hodiaŭan aspekton donis al ĝi aŭstroj dum la 18-a jarcento.

Veturo trans Danubon ĝis la koro de Novi Sad, vizito al la historia urbocentro inkluzive de: *Serba Popola Teatro*, *Placo de Libero* kun la *Urbodomo*, monumento al *Svetozar Miletiĉ* (serba politikisto kaj revoluciulo el la 19-a jarcento, kiu estis ankaŭ urbestro de Novi Sad), la katolika *Preĝejo de la nomo de Maria*, la ortodoksa *Episkopejo*, la *Danuba Parko*. Libera tempo.

Ekiro al Beogrado en malfrua horo posttagmeze. Reveno ĉirkaŭ la 19-a horo.



Placo de Libero – Novi Sad

# **TT2. Smederevo kaj Viminacium** – tuttaga busekskurso

**Tago kaj tempo**: la 23-a de julio 2025, 08h00–19h00

**Prezo**: 49 EUR

- inkluzivas la veturigon, ĉiĉeronadon kaj enirbiletojn
- ne inkluzivas tagmanĝon

Ĉi tiu ekskurso kunligos la mezepokan historion de Serbio, la romiajn tempojn sur Balkana Duoninsulo, la miocenan pratempon de mamutoj kaj la nuntempan belecon de la regiono.

La *Fortikaĵo de Smederevo*, konstruita en la 15-a jarcento, estas unu el la plej vastaj fortikaĵoj en Eŭropo.

La romia soldatejo kaj urbo *Viminacium* estis ĉefurbo de la romia provinco *Supra Mezio* (Moesia Superior) inter la unua kaj kvara jarcentoj. Hodiaŭ, en ĝia *mamutparko*, la ĉefa eksponaĵo estas komplete konservita skeleto de la mamutino *Vika*, kiu altis inter 4 kaj 5 metroj.





Smederevo – la Urbodomo

## PROGRAMO DE LA EKSKURSO

- Ekiro el Beogrado je la 8-a horo; veturo ĝis la urbo *Smederevo*; vizito al ĝiaj *Fortikaĵo* kaj *Nacia Muzeo*.
- Veturo al *Viminacium*, vizito al la *arkeologia parko*: imperiestra maŭzoleo, romia varmbanejo, amfiteatro, scienc-esplora centro, mamutparko.
- Intertempe paŭzo por tagmanĝo. Opcioj:
    - Lunĉpakaĵo el la hotelo, se vi rezervis tagmanĝojn en la kongresa hotelo
    - Surloke mendi kaj mem pagi tagmanĝon en loka restoracio
- En malfruaj posttagmezaj horoj reveno en Beogradon. Veno sur la ekirlokon ĉ. la 19-a horo.



Viminacium – amfiteatro


Viminacium – arkeologia parko

# **TT3. Resava** – tuttaga busekskurso

**Tago kaj tempo**: la 24-a de julio 2025, 08h00–18h30

**Prezo**: 55 EUR

- inkluzivas la veturigon, ĉiĉeronadon kaj enirbiletojn
- ne inkluzivas tagmanĝon

La ekskurso sudorienten al la regiono de rivero Resava, gvidos al la naturaj kaj historiaj riĉaĵoj de Serbio je nur 140 km for de Beogrado kunligante la geologian kaj novtempan historiojn de la regiono.

La monaĥejo *Manasija*, arkitektura kaj freskoarta majstroverko de serba mezepoka kulturo, unu el ĉefverkoj de la *Morava stilo*, estis sidejo de la fama *Resava Skolo* – manskriba kaj tradukista ateliero, siatempa centro de spirita kulturo kaj klereco.

Por la impona *Kaverno de Resava*, kun ĝiaj stalaktitoj, stalagmitoj kaj ŝtoniĝintaj akvofaloj en koloroj ruĝa, flava kaj blanka, aĝaj 45 milionojn da jaroj, vestu vin varme ĉar la temperaturo en ĝi estas 7°C dum la tuta jaro.



*Akvofalo Veliki Buk*




## LA PROGRAMO DE LA EKSKURSO

- Ekiro je la 8-a horo, veturo ĝis la monaĥejo *Ravanica* el la 14-a jarcento. Dumvoje nelonga refreŝiĝo en etnostila gastejo-ripozejo *Moravski Konaci* (Tranoktejoj ĉe Morava).
- Veturo al la *Kaverno de Resava*, vizito al la kaverno kun gvido de faka ĉiĉerono.
- Pluveturo ĝis la pitoreska ekskursejo Lisine ĉirkaŭ la pli ol 20 metroj alta akvofalo *Veliki Buk* (Granda Bruo) falanta en smeraldan lageton *Zelenika (Verdujo). Paŭzo por tagmanĝo kaj promeno en la belega naturo.* Eblos tagmanĝi en unu el ĉarmaj restoracioj, kiuj ofertas specialaĵojn de la loka gastronomio.
- Veturo ĝis kaj vizito al la monaĥejo Manasija el la 15-a jarcento.
- En malfruaj posttagmezaj horoj reveno en Beogradon ĉirkaŭ 18h30.





Monumentparko Ŝumarice

## **TT4. Kragujevac kaj Topola** – tuttaga busekskurso

**Tago kaj tempo**: la 25-a de julio 2025, 08h00–18h00

**Prezo**: 49 EUR


- inkluzivas la veturigon, ĉiĉeronadon kaj enirbiletojn
- ne inkluzivas tagmanĝon, kiu mendeblas kaj pageblas aparte

*Kragujevac* estis la unua ĉefurbo de Serbio post la liberiĝo elsub la turka *Otomana imperio* komence de la 19-a jarcento. Hodiaŭ ĝi estas la kvara plej granda urbo de Serbio, grava industria, universitata, kultura kaj administra centro.

La proksima urbeto *Topola*, fama kiel vinregiona centro, estis gvidloko de la *Unua serba ribelo* kontraŭ turkoj en la jaro 1804. Proksime de tie naskiĝis kaj tie rezidis la gvidanto de la ribelo *Ĝorĝe* (Georgo) *Petroviĉ – Karaĝorĝe*, fondinto de la dinastio de Karaĝorĝeviĉoj.



Malnova urbodomo de Kragujevac




## PROGRAMO DE LA EKSKURSO

- Ekiro el Beogrado je la 8-a horo, veturo ĝis Kragujevac.
- Vizito al la *monumentparko Ŝumarice* kun la muzeo *Oktobro de Kragujevac*, dediĉita al viktimoj de la nazia teroro en la Dua mondmilito.
- Vizito al la urbocentro, *Princa-Serba Teatro*, *Malnova Parlamentejo*, en kiu estis aprobita la unua konstitucio de moderna Serbio, kaj aliaj historiaj kaj kulturaj perloj de Kragujevac.





La Domo de Petro

- Paŭzo por tagmanĝo. Opcioj:
    - Lunĉpakaĵo el la hotelo, se vi rezervis tagmanĝojn en la kongresa hotelo
    - Surloke mendi kaj mem pagi tagmanĝon en nacistila restoracio
- Pluveturo al la urbeto Topola, vizito al la moumentkomplekso sur la monto *Oplenac* inkluzive de: la *Domo de Petro*, la *Kazerno de Karaĝorĝe* kaj la *maŭzolea preĝejo "Sankta Georgo"* de la dinastio de Karaĝorĝeviĉoj, ornamita per 752 mozaikaj replikoj de famaj freskoj el serbaj mezepokaj monaĥejoj sur 3.500 kvadrataj metroj de la interna mura surfaco, kiuj konsistas el 40 milionoj da diverskoloraj vitraj kubetoj en 15.000 nuancoj.
- Reveturo al Beogrado en malfruaj posttagmezaj horoj. Veno ĉirkaŭ 18h00.




# ILEI-kongresa bankedo

**Tago kaj tempo:** la 24-a de julio 2025, 20h00–22h30

**Loko:** La restoracio *Tri ŝeŝira (Tri ĉapeloj)* en la bohemia strato *Skadarlija* de Beogrado, je unukilometra (15-minuta) promendistanco de la kongresejo

**Prezo:** 38 EUR

## Menuo:

**Por vegetaranoj kaj veganoj** estos specife adaptitaj menuoj laŭ viaj mendoj kaj esprimitaj manĝpreferoj.

**Por nevegetaranoj** *(la fotoj ilustras nur parton de la oferto por la bankedo)*

- Antaŭplado: Bova kaj porka fumaĵoj (fumsekigita viando), vojvodin-slavonia spica kolbaso, kajmako (specialaĵo el salita laktokrusto), blanka fromaĝo el sudokcidenta Serbio, panumita farĉita kapsiko, fritita pasto farĉita per fromaĝo, kapsiko kaj fumaĵo (aŭ sen fumaĵo, por vegetaranoj)
- Ĉefplado: Diversaj rostviandaĵoj, ekzemple: ĉevapĉiĉoj (kebabetoj el muelita viando), kradrostita kolbaso, roststangetoj de kokidaj viandopecoj envolvitaj en lardon, porkaj ripviando kaj kolviando, kokida femuraĵo kaj kajmako
- Salatoj: Ŝopa salato (regiona specialaĵo el tomato, kukumo, kapsiko, cepo kaj raspita blanka fromaĝo), printempa salato, ajla kapsiko (bakitaj ruĝaj kapsikoj kun ajlo kaj oleo, spicitaj per salo kaj vinagro)
- Pano: platpano, pano el plena greno, ajlaj panstangetoj



- Deserto: Ĉokolada torto
- Trinkaĵo: Minerala akvo bobela kaj senbobela
  Pliajn trinkaĵojn vi povos mendi laŭplaĉe kaj mem pagi laŭmende

**Muziko:** Nacia muzikgrupo de la restoracio



# Pagmanieroj

(karavano, ekskursoj, bankedo):

**Eksterlandanoj:** (kiel ĉe la kotizopago, prefereble uzu la unuajn du opciojn)

- **Al ILEI-konto ĉe UEA ilek-a**, indikante „ILEI-Kongreso 2025"
- **Al ILEI-konto ĉe ING-banko**, IBAN: NL55INGB 0004676855, BIC: INGBNL2A, aldonante 5 €; el EU-landoj senkoste.
- **Al la fremdvaluta konto de Serbia E-Ligo**: „Udruženje esperantista Srbije" ĉe NLB Komercijalna banka AD vidu la paginstrukciojn (Atentu pri la bankokostoj! Ĝis nun la banko prenis po 10 eŭroj ĉe ĉiu pago.)

**El Serbio:**

Al LKK al dinara bankokonto de la landa asocio „Udruženje esperantista Srbije" ĉe NLB Komercijalna banka AD, 205-0000000422411-63 (sendu konfirmilon al laslo.az@gmail.com, serbialigo@gmail.com)

**Bonvolu sendi informon** pri via pago al LKK: ilei.kongresoj@gmail.com kaj laslo.az@gmail.com

Bonvenon kaj agrablan restadon!

***Noto**: Ĉefa fonto de la fotoj en tiu ĉi e-broŝuro estas Wikimedia Commons. Klako al unuopaj ekskursaj fotoj gvidas vin al la originalo kaj donas informojn pri la fotisto kaj pri la foto mem.*